

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1980

N° 77

PROPAGANDO KAJ VARBADO PERE DE LA GAZETAROJ

Oni ne sufiĉe uzas la nacian, regionan kaj lokan gazetaron por la propagando kaj varbado, precipe ĉar tio estas senpaga .

Jen ekzemploj kiuj pruvas, ke oni povas havi bonajn rezultojn.

En Perpignan okazo de pikniko Sro Llech-Walter sendis artikolojn al la gazetaro kaj radio kaj donis adreson por la informoj.

Tuj, iu sinjoro, oficisto en "Journal Officiel" en Parizo vizitis Llech-Walter kaj informis lin pri sia deziro lerni esperanton .

Li libertempas en Argelès sur Mer, sed loĝas en Draveil, apud Parizo. Kun plezuro li aĉetis la verdan propagandan broŝuron de UFE, kie estas nomo kaj adresoj de esperantisto en Draveil.

Kuriōza afero estas, ke tiu sinjoro (Roland Colar) neniam aŭdis pri esperanto, tamen ekzistas loka gazeto en Draveil !

Dua afero : Sro Jean Vautrin, 3, Rue du Temple, Collioure skribis al Llech-Walter, post afero de la artikolo, kaj klarigis ke li estis membro de la Pariza Federacio, sed pro tro da laboro li forlasis la movadon.

Ĉar Vautrin estas nun emerito, Llech-Walter skuis lin (afable) kaj li promesis aliĝi denove al la movado.

Bona rekaptado, ĉar la rekaptito posedas la Pedagogian Ateston.

Uzu do larĝskale la gazetaron !

A.V.

D-ro SALAN estas mortinta

Fulmotondro en serena ĉielo sub la nimesa grupo. La pasinta 5-an de februaro D-ro Ĝeorgo SALAN koratakita mortis subite post malmultaj horoj en hospitalo, li estis unu el la lastaj eminentuloj de nia regiono. Li fariĝis prezidanto de nimesa grupo nur de post kelkaj monatoj kaj bedaŭrinde la grupo denove kondolencas. Sur venonta bulteno pli longe kaj detale oni raportos pri lia vivo.

S-ino Fernande CHAUDOUARD, el NIMES, skribis al ni :

" ni ĵus trovi en "De Vi kaj S-ano Léger subskribita Vortaro" la vorton "bégayer" tradukitan : ripetbalbuti kaj tartali.

Ĉi-lastan vorton vi sekvigas de asterikso; tio sendube signifas, ke ĝi estas de vi proponita. Tiu vorto tre plaĉas al niaj grupanoj sed ili sin demandas, kiu estas ĝia etima deveno."

Efektive la asterikso (vidu la vortaron sur paĝo 8-a) signifas, ke ni ne konstatis la enskribon de l'koncerna vorto en vortaroj de ni konataj : ni trovis ilin legante plej diversajn tekstojn kaj decidis ilin noti pro ilia taŭgeco. Ke poste aliaj aŭtoroj protestis apud ni, ke tiuj kaj tiuj ĉi jam enestas tie kaj tie for, ja estas alia afero.

Mi konfesu, ke neniu protestis pri "tartali", sed se ni decidis enmeti ĝin apud ripetbalbuti, la motivo por tio estis interalie, ke la nova vorto ankaŭ al ni plaĉis : ĝia fonetika strukturo tre taŭgas kaj tre elvokas ĝian signifon preter ĉia etimologio.

Balbuti estas tre oportuna vorto pro ties ĝenerala signifo : ne-perfekte paroli kun hezitado kaj malfacilo. Eblas ĝin precizigi; ekz-e, per "ripetbalbuti" priskriba vorto. Ĝi ja devenas de la latina "balbus" kiu ĝuste signifis "ripetbalbutulo" : la signifo de tiu radiko larĝiĝis en la latinidaj lingvoj.

TARTALADO estas aparta balbutado, konsistanta en tio, ke la hezitado kaj malfacilo estas farita el ripetado pli kaj malpli kohera, pli malpli kompleta de l'sama silabo de vortoj.

Ne eblas scii, de kiu lingvo la iniciatinto de tiu vorto prenis ĝin; sed ni kune konstata, ke la Itala posedas la verbon "tartagliare" (prononcu "tartaljare"), kiu proksimume signifas "balbuti, misparoli, tartali". Ni konstata ankaŭ ke la Hispana posedas tri preskaŭ-sinonimojn : "tartajear" (=balbuti), tartalejar (=implikiĝi en sia parolo, misparoli) kaj tartamudejar (prononci kun malfacilo, ripetante la silabojn de l'vortoj; do : tartali). Ni povas do diri, ke la elekto de l'nova vorto estis inspirita de tiuj du lingvoj aŭ de unu el ili; sed ke - laŭ ĝenerale konstatebla fenomeno de nia lingvo, aŭ almenaŭ -emo ĉe ni Esperantistoj - la signifo estas multe pli strikta en Esperanto. Kiel dirite, la formo mem de l'vorto certe ludis sian rolon.

Preter tio, ne estus mirige, ke la deveno de l'Itala kaj Hispanaj vortoj mem estus, ni diru, onomatopea. Almenaŭ ni konstata, ke preskaŭ saman dusilabon, nome Tartaro, oni iam ekuzis por nomi popolon, kies parolojn oni ne komprenis. Similan devenon prezentas ankaŭ la vorto "barbaro" per kiu la Hellanoj aŭ antikvaj Grekoj nomis ĉiujn fremdulojn kiuj ne klare elparolis la belan kaj kulturitan lingvon de l'diversaj civitoj de Hello, ĉi unu el la unuaj pra-forĝejoj de nia civilizo.

Verŝajne, ekzistas aliaj tiaj vortoformaĵoj; ni citu "Berberoj" el Magrebo, sed ĝi estas nur alia formo de Barbaro; ankaŭ Ciĉimekoj el Meksiko...la detruintoj de l'Tolteka imperio ! Kaj kompreneble ni revenu al la Latina "balbus".


Pli ĝenerale ni agnosku, ke tiu afero de parolmaniero ĉe fremduloj pli ol unu fojon incitis la homojn. Ekzemplo estas la nomo donita al la Germanoj en ĉiuj slavaj lingvoj, aŭ preskaŭ, kaj ankaŭ en aliaj orientaj kiel la Hungara kaj la Rumana; oni tie ilin nomas "Nemci", Nemeĉ en la singularo. Nu ! tio signifas ankaŭ "mutulo". La slavo ne povis ilin kompreni, kaj reciproke.

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1- Ŝirmilo sur tegmento (R)
- 2- Prepozicio - Malbonaj higienaj kondiĉoj favoras ĝian disvastiĝon
- 3- Al li imponi estas tro facile (R) - Ĝi esprimas amon (R)
- 4- Ĝi ne plu makulas la kajevojn de la hodiaŭaj lernantoj (R)
La unua nomo de tabako (R)
- 5- Ĝiaj banoj estas famaj en Balaruko (R)
Rondforme li laboras pri lignon, ebenon... aŭ potojn -
- 6- Komenciĝi - Horizontala trabo sur pordo (R)
- 7- Tempa daŭro (R) - Rivero en Sovetio
- 8- Fiŝreto trenata de ŝipo (R) - Rilata al Sicilia vulkano - Fonetike hundo
- 9- Suplikso - Falpola arbo kies floroj oni uzas por tizanoj - Montra pronomo
- 10- Grava ornama laboro ĝardene kultura kaj kies subĝenro estas azaleo.
- 11- Grekdevena scienca vorto kies signifo estas orolo
Brumero komenciĝis la 22-an de tiu monato
- 12- Hindua sistemo de filozofia meditado kaj asketismo
Oni ne pagas al ĝa sia per gloro.



René Raynaud (1980)

Vertikale



- 1- Belaj blankaj aŭ rozaj grandaj vadbirdoj
- 2- Germana lancisto - Pinta ungo lokita malantaŭe de la tarso de kelkaj birdoj
- 3- Flavmalsano - Hundo (R)
- 4- Mara birdo (R) - Skota jupo
- 5- La figokakto estas la plej konata specio - Planlingvo lanĉita en 1907
- 6- Firmo dependa de alia ŝefa - Tre plezurigi (R)
- 7- Lirika poemo (R) - Fonetike: petalaro -
Tia ke ĝi eligas klava kaj iom tremanta sono
- 8- Ekrimarki la identecon de - Streĉa interplektiĝo de du fadenoj
- 9- Tia estas bona lernanto por la aliaj - En ribelo
- 10- Li laboras en fandejo - Filo de Odino
- 11- Nedefinita pronomo - Resti ĝis la alveno de iu - Metalo (R)
- 12- Ili okupiĝas pri farado de vino


* - (R) nur radiko

* - Solvo de la antaŭa problemo


A	L	M	O	S	P	E	T	A	N	T	O
P	O	E	T	O	K	O	R	O	D		
R	A	T	S	T	I	P	E	N	D	I	
I	R	A	N	T	A	R	O	O	R	L	
L	O	F	E	I	R	E	J	O			
A	O	G	R	O	O	R	G	E			
V	A	R	I	O	L	O	I	L	S		
E	O	R	I	R	O	N	I	T			
T	A	L	I	V	E	R	A	N	T	O	
E	K	R	A	N	L	A	C	R	N		
R	U	E	N	N	O	O	R	U	T		
O	T	D	U	E	M	J	E	L	O		

Solvo
 de la krucvortoj
 aperintaj sur la N° 75


5 minutoj de paŭzo




Mi ĝin acetis en vendejo de militrestaĵoj : la infanojn ĝi bone amuzas, krome ĝi entenas facile la legomelspezojn.



Kiamaniere vi povas veni el ĉielo sen spacunifermo ?



SEN VORTOJ



Certe vi ridetos, karulo, sciante ke la katino poste malsupreniris tute sola el arbo.




Kion faris mia anĝeleto, dum la dormeto de sia patro ?

ALVENOJ



FORIROJ



VINTRAJ SPORTOJ

R. Frous

Nun pri "adverba participo". En LINGVAJ RESPONDOJ N° 117 (6-a eldono), Z. skribas "...Adverbo participa povas esti uzata nur tiam kiam ĝi rilatas al la subjekto de la frazo."

Menciinde estas, ke ĉ. 1930 la Franca Akademio formulis similan rekomendon ! Kial ? Per igi la lingvon pli klara !

En la pasinteco oni povis trovi frazon kiel:

"Koro lia batas, frapante sur la klavon" (de la piano) (Romain Rolland en "Jean-Christophe" ĉ. 1910). Sed nun, ne plu !

Kaj kion ni vidas en Esperanto ? Tute inversa procezo kondukas al komplikigo de la lingvo, al "uzado" laŭkiu la basa regulo ne estas obeata.

Ĉu ni povas toleri, ke fama esperantisto skribu en la sama paĝo :

"ĝenerale parolante" kun la senco "se paroli ĝenerale" kaj "parolante pri... mi povas aserti ke..." en kiu "ante" efektive rilatas al la subjekto ?

En freŝdata numero de tre bona revuo, oni povas legi :

"la prezoj eĉ nuntempe montriĝas malpli altaj, -ankaŭ konsiderante la salar-nivelon - ol en okcidentaj landoj." Ĉu sub influo de la "uzado" ?

Se breĉo fariĝas en digo oni : aŭ lasu la akvon pli/grandiĝi ĝis cedos la digo kaj lasos pasi la fluon, aŭ oni tuj ŝtopu la breĉon. Sajne, la dua solvo estas la nura bona .

Mi ja scias, ke la PLENA ANALIZA GRAMATIKO en paragrafo "Adverbaj Adjektoj"

Rim. I, pri-traktas la aferon por kontribui al ŝtopigo de la breĉo. sed ĉu tio sufiĉas ? Kiom da homoj posedas ĝin ?

Ĉu por ambaŭ problemoj (ŝati-ami kaj adverba participo) la AKADEMIO, post publika debato se necesas, ne devus unu fojon por ĉiuj REKOMENDI, kion oni devas fari. Tiuj "rekomendoj" aperus en diversaj Esperantaj ĵurnaloj kaj tiamaniere atingus multe pli grandan nombron da Esperantistoj.

Mi ĉi-supre aludas pri la problemoj, kiuj stariĝas, kiam mi instruas E. Sed mi devas aldoni, ke en mia vivi, mia fido al Esperanto ofte ŝanceliĝis pro tiuj aferoj.

Mi ŝuldas al du kompetentaj Esperantistoj, al kiuj mi min turnis ofte, la fakton, ke mi ree kuraĝiĝis, post pri lingvaj krizoj, plurfoje travivitaj.

Por ke la aliaj "mezuloj" ne spertu samajn krizojn, por ke ili restu fidelaj al la L.I., mi admonas Akademion fari ion pozitivan por "normigi" la lingvon.

LENTAIGNE

3, Av. Gaillarde

FR. 34000 MONTPELLIER

-----:--:--:-----

DEPARTEMENTA GARDA KUNVENO : Ĝi okazos en ALES Dimanĉon

25 de Januaro, je la 9 1/2 horoj, ĉe la Kultura Centro...

-o-o-o-o-o-o-o-o-

FEDERACIA KONGRESO :

La kongreso okazos je 16an k. 17-an de Majo 1981 en la KULTURA CENTRO PABLO NERUDA, Place Hubert Rouger (apud Bul. J. Jaurès)

Tie ni probable lunĉos sed ne povos tranokti. Bonvolu tuj rezervigi hotelon indikante kategorion k. prezon al S-ino MOUNIER 17, Av. De Lattre de Tassigny, 30000 NIMES (tel. (66) 26.52.76



LINGVA ANGULO

BALBUTI kaj TARTALI (F i n o)

Ili do mutiĝis ! Eble tiu klarigo ne estas plene vera, ĉar iu Ĝermana tribo nomiĝis "Nemetoj", same kiel okcidenta tribo, la Alemano, donis la francan nomon de Germanoj kaj same kiel norda, la Saksonoj aŭ Saksoj, estis la bazo por "Saksa" en la finna lingvo.

Sed nu ! Por citi Francaĵo : mi alfinigu ĉi-tie nian "blablablyaon" !

D-ro André ALBAULT

aŭ : Ĉu Esperanto dialektiĝos ?

La artikolo de K.Ŝ. en ESPERANTO (1980/129) estas pruvo, ke restas ankoraŭ laboro por la Akademio !

Mi aludos pri AMI-SATI kaj poste pri "adverba participo". Esperantisto de 50 jaroj, mi estas unu el tiuj "mezuloj", kiu praktikas preskaŭ ĉiutage, kiu instruas la lingvon kaj frontas kontraŭ problemojn.

En la franca ĵurnalo "MONDE" (1953), konata franca eksministro skribis :

"Unu el la malfacilaĵoj de internaciaj konferencoj troviĝas en la malsama senco de vorto ekzistanta en diversaj lingvoj". kaj li donas kiel ekzemplon la anglan CONTROL kaj la francan CONTROLE. (vidu ankaŭ PIV : "kontroli").

En OOMOTO N° 277-278 NAKAMURA rakontas (laŭ artiklo aperinta en "CUO KORON" (1957), kiel misinterpretado de la vorto "MOKUSAGU" fare de la Usonanoj okazigis falon de la atombombo sur HIROSHIMA kaj NAGASAKI. Ĉu ankaŭ en Esperanto ni povas toleri, ke ŝati havu nekla-
ra signifon ? Ĉu tio indas je nia lingvo ? Ĉu la esperantistaro divi-
ĝos en du skolojn : la ŝati-anojn kaj la ami-anojn, same kiel por
ATA-ITA ?

Ĉu vi imagas la ĝenon, kiun mi spertas, kiam instruante la lingvon, mi konfesas : "kelkaj diras AMI dum aliaj preferas SATI" ? Ĉu mi ne kreas danĝeran perturbon en la menso de la lernanto, kiu eble pensos ; Ĉu ESP. ne riskas dialektiĝi ?

K.Ŝ. citas : "La plej grava leĝodono estas la uzado "(Z)". Sed ankaŭ tion Z. skribis : "La L.I. povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene egale." Ni devas trovi kompromison inter ambaŭ opinioj. Sed, se paroli sincere, ĉu vere la "uzado" estas ĉiam rekomendinda ? Ĉu vi ne rimarkis, ke la homoj prefere imitas ĉion, kion ili ne devus imiti ? Stranga sinteno, ĉu ! Sed tiel estas

Preskaŭ ĉiuj francoj erare uzas "komenci" anstataŭ "komenci-
ĝi" pro influo de la franca. Sed ankaŭ alilingvanoj ! Ĉu pro imitemo aŭ influo de ilia lingvo ? Se iam 80% el la esperantistoj sekvas tiun vojon, ĉu oni deklaras ke pro la uzado la regulo pri "komenciĝi" ar-
kiviĝis kaj devas malaperi ? Aliaj ekzemplojn oni povus facile trovi !

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 4^{me} Trimestre 1980

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes